Procezoj kaj stiloj de lernado

Lernado bazita sur la eksperimentado laŭ Kolb

Dank’ al la grava rolo ludita de la eksperimentado en la modelo de Kolb, tiu teorio de lernado estas nomata **lernado per eksperimentado** (***experiential learning***).

Bazaj orientiĝoj de la lernado

ciklo de lernado en kvar fazoj / ***learning cycle***



Learn Create Share!

Bunta Esperanto Asocio

Konkreta sperto

La individuo estas plene implikita en la percepto kaj esperimentado de la datumoj de la spertoj.

KE – Orientiĝo al la Konkreta Eksperimentado

Tiu kiu montras tiun lernadan profilon emas al la rekta kaj **persona engaĝiĝo en la eksperimentado,** donante emfazon al la intuicia kaj emocia flanko, je malprofito de tiu racia kaj scienca, kiam oni alfrontas la problemojn. Bonegaj estas la kapabloj interhomaj kaj sociaj; la medio taŭga por tiaj lernantoj estas tiuj kiom eble plej malstrukturitaj, kun la impliko en realaj kaj konkretaj problemoj, kiuj bezonas grandan mensan malfitermecon.

Pripensema observado

La individuo funkciigas **pripenseman observadon de la realo**, kiu favoras komencan aktivan konceptigon.

PO – Orientiĝo al la Pripensa Observado

Tiu kiu montas tian lernadan profilon klopodas precipe **kompreni la signifon de ideoj kaj situacioj**, donante emfazon al la observado kaj komprenado pli ol al la apliko. Tiuj homoj havas grandan kapablon skizi rilatojn de kaŭzo-sekvo kaj do eltiri sekvojn el la faktoj. Krome, ili havas la kapablon vidi la samajn situaciojn laŭ malsamaj vidpunktoj, montrante trankvilecon, senpartiecon kaj juĝaŭtonomecon.

Abstrakta konceptigo

Surbaze de la antaŭa konceptigo la individuo **prilaboras kromajn abstraktigojn** kiuj donas la eblon dedukti funkciadajn rilatojn.

AK – Orientiĝo al la Abstrakta Konceptigo

Tiu kiu montras orientiĝon al la abstrakta konceptigo emas **manipuli ideojn kaj konceptojn laŭ logikaj principoj**, multe implikante en la kona ago la penson kaj malmulte la emocian flankon. Estas do tre taŭga en tiaj homoj la emo plani kaj projekti, manipuli abstraktajn simbolojn kaj fari kvantajn konsiderojn. La valoroj esprimitaj de tiaj homoj estas la precizeco, la disciplino, la analizo kaj la ĝenerala strukturigo de konceptaj sistemoj.

Erasmus+
Learn Create Share!
Bunta Esperanto Asocio

Aktiva eksperimentado

La individuo estas nun kapabla **produkti klarigajn konceptojn kaj agajn teoriojn** pri la sperto kiu, kiel nova nivelo de kono, povos ĉiam esti testataj denove fare de la **konkreta sperto**.

AS – Orientiĝo al la Aktiva Eksperimentado

Tiu kiu montras tian orientiĝon emas agi sur la realo (rilata al situacioj aŭ al homoj) por ĝin ŝanĝi. Ties kredo estas la ago pli ol la pripenso kaj tio kondukas al afronto de la realo en maniero vere pragmata, **zorgante pri la funkciado de la aferoj sendepende de ilia valoro aŭ absoluta signifo**. La homoj kiuj montras tion estas do kapablaj ŝanĝi la situaciojn kaj atingi kaj realigi la rezultojn.

Learning cycle

La modelo de la ***learning cycle*** de Kolb ekzaltas la aspekton eksperimentan, aktivan kaj interdipendan – rilate al la grupoj kaj la medio – de la lernada proceso, karakterizitan de daŭraj adaptiĝoj kadre de perspektivo, neniam fermita, de perfektigeblo.

La stiloj de lernado

Tiuj prezentitaj estas la kvar **orientiĝoj** el kiu estas poste eltiritaj la veraj **stiloj de lernado**. Fakte, estas el la kombinaĵo de la orientiĝoj ke oni eltiras la kombinitajn profilojn el kiuj venas la stiloj de lernado. **La individua stilo de lernado estas do kombinaĵo de ĉiuj kvar bazaj manieroj priskribitaj antaŭe**.

Erasmus+
Learn Create Share!
Bunta Esperanto Asocio

La stiloj de lernado

Kolb asertas ke la individuo, dum sia vivo, atingas emon por apartaj bazaj stiloj de lernado, kiuj situas ĉe la punktoj kie renkontiĝas la kvar momentoj de la lernada ciklo. Ili dividiĝas en kvar grupoj:



Learn Create Share!

Bunta Esperanto Asocio

Diverĝa

La **diverĝa** stilo estas de tiu kiu preferas la konkretan eksperimentadon kaj la pripensan observadon, kiu posedas la kapablon arigi kaj produkti ideojn; tiu estas tial kapabla **organizi la kompleksecon de la rilatoj en sistema vidpunkto**.

Konverĝa

La **konverĝa** stilo estas de tiu kiu emas al abstrakta konceptigo, al aktiva eksperimentado kaj al deduktaj rezonadoj; tiu estas do kapabla labori por praktikaj celoj **pere de analizaj solvaj vojoj**.

Konsentema

La **konsentema** stilo estas de tiu kiu en la lernado preferas la aktivan eksperimentadon kaj la konkretan sperton, de tiu kiu **solvas la problemojn en intuicia kaj tuja maniero kaj kiu kapablas mastrumi la urĝajn bezonojn.**

Asimilema

La **asimilema** stilo estas de tiu kiu preferas la fazojn de pripensema observado kaj de abstrakta konceptigo, de tiu kiu posedas la kapablon teorie modeligi, kiu elektas induktajn procedojn de rezonado.

Stiloj de lernado kaj sensoj

Depende de la sensoj, kiujn ni uzas plej ofte por lerni, nia stilo de lernado varias. Ekzistas kvar makrogrupoj:

La vida ikonografia

Kiu plejofte utiligas la okulojn por lerni, tiu preferas la uzon de dezegnoj, skemoj, mapoj, videoj, grafikaĵoj, fotoj, ktp.

Ekzemplo

Tiu kiu apartenas al tiu ĉi grupo povas bone troviĝi, ekzemple, kun la **videoscribing**, tekniko de faciligado de la memoro kiu integrigas la bildojn kaj la datumojn al la teksto, igante la rakonton pli interesa kaj engaĝiga.

La vida parola

Ĝi estas la plej utiligita metodo en la lernejo. Tiu kiu lernas pleje per tiu kanalo preferas la legadon/skribadon, la lumbildojn, la resumojn kaj la notojn.

Ekzemplo

La **cerboŝtormo** estas utila kaj krea ilo por emerĝigi ideojn. Utiligebla unuope aŭ grupe, ĝi baziĝas sur la interrilato de ideoj, vortoj kaj bildoj kaj helpas produkti strukturitan paroladon.

La aŭda

Por tiu kiu **preferas la aŭdadon por lerni**, estas utilaj la aktiva partoprenado en la leciono, la gruplaboro, la laŭtvoĉa ripetado, la registrado de la lecionoj, la aŭdlibroj.



Ekzemplo

La podkastoj povas esti bonegaj iloj por lerni per oreloj. Ĝi estas teknologio kiu ebligas la aŭskultadon de **aŭdaj dosieroj en interreto** kun daŭra ĝisdatigo. Ekzistas multegaj el ili kaj pri ĉiu temo.

La kinestezia

Taŭga por tiu kiu preferas praktikajn aktivaĵojn kaj kiu lernas farante aĵojn. Ekzemple, konstruante plastikaĵojn, kreante mapojn aŭ eksperimentojn.

Ekzemplo

Por la kinestezuloj la **rolludoj** estas efikaj lernoteknikoj. Depende de la elektita ludo, la ludantoj prenas la rolon de unu aŭ pluraj homoj en fikcia loko kie disvolviĝas engaĝigaj rakontoj.

Stiloj de lernado kaj de instruado

Por la trejnistoj estas tre grave koni la stilojn de lernado. Fakte, por ĉiu stilo de lernado ekzistas koresponda stilo de instruado.

La stiloj de instruado

Kio ili estas?

La stiloj de instruado

Ĉiuj preferoj de la instruisto en la manieroj, metodoj, aktivaĵoj kaj materialoj, kiujn oni utiligas kaj prezentas.

La stiloj de instruado

Kutime la instruisto rilatas al sia propra stilo de lernado aŭ al la modeloj observitaj kiel studento.

La stiloj de instruado

La supereco de iu stilo de instruado kiu ne zorgas pri la diversaj stiloj de lernado ĉeestantaj en iu klasgrupo povas konduki al modestaj rezultoj en la didaktiko eĉ se la propono estis pensita kiom eble plej bone.

Stiloj de lernado kaj de instruado

Estas fundamente koni ne nur la diversecon de la stiloj de lernado sed ankaŭ la **individuajn karakterizojn de ĉiu lernanto**. Tiel estos rimarkinda plibonigo en la akiro de la nocioj kaj en la etoso de la klaso.

Erasmus+
Learn Create Share!
Bunta Esperanto Asocio

Stiloj de lernado kaj de instruado

La trejnisto, atente sekvante la edukan procezon de ĉiu lernanto, kadre de pli plurinklina kaj strukturita lernado, **devus stimuli la uzon de aliaj stiloj de lernado**, ene de la limoj kiujn la ĉefa stilo fiksas.

Learn Create Share!

Bunta Esperanto Asocio

Stiloj de lernado kaj de instruado

Tiel la studanto ne nur ekkonos pli bone siajn proprajn ilojn, sed trejniĝos malkovrante pli komplikajn strategiojn.

Stiloj de lernado kaj de instruado

Por malkovri la lernadan stilon de ni aŭ de la studentoj de iu klaso, oni povas utiligi **demandarojn kun pluraj respondeblecoj** aŭ **rektajn intervjuojn** celantajn al la malkovro de la iloj kaj de la tempoj de lernado, de la uzitaj strategioj, de la fortoj aŭ malfortoj.

Stiloj de lernado kaj de instruado

Esti konsciaj pri la propraj stiloj de instruado kaj pri la stiloj de lernado de la klaso igos pli simpla la aŭtonomecon de la eduka procezo de ĉiu lernanto.